# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-08 n-ro 410


# Novaj horizontoj trans Plutono



Japanio: la sekretaj ekzekutoj daŭras

En la fundo de la reto

Esperanto elstaras en greka kalendaro

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Japanio: la sekretaj ekzekutoj daŭras
*Du viroj estis sekrete ekzekutitaj p. 03*

Botelo de pli ol unu miliono da eŭroj antaŭnelonge ŝtelita estis trovita
*Farita el 3 kilogramoj da oro kaj 3 kilogramoj da argento p. 04*

Esperanto elstaras en greka kalendaro
*Bankoficista Sindikato de la Nacia Banko de Grekujo p. 04*

En la fundo de la reto
*94 procentoj de ĉiuj retdatumoj p. 05*

Hodiaŭe
*Kornel Makuszyński; kaj Armenio p. 06*

Novaj horizontoj trans Plutono
*Nova naŭa planedo p. 07*

# Japanio: la sekretaj ekzekutoj daŭras

Du viroj estis sekrete ekzekutitaj la 19-an de decembro 2017. Tio atestas denove pri la malestimo de la registaro por la rajto al vivo.




Teruhiko Seki, 44-jara, deklarita kulpulo pri murdo kaj ŝtelo kun pligravigaj cirkonstancoj, kaj Kiyoshi Matsui, 69-jara deklarita kulpulo pri murdo, estis ekzekutitaj frumatene, mardon la 19-an de decembro, en malliberejo de Tokio.

Teruhiko Seki aĝis 19 jarojn en la epoko de la riproĉaj faktoj. Ambaŭ viroj petis novan proceson, kiam ili estis ekzekutitaj.

La registaro eraras, se ĝi opinias, ke mortopuno estas efika rimedo por atingi justicon. Ĝi estas la plej kruela, nehumana kaj malnobliga el ĉiuj ekzistantaj punoj – tiu fakto estas agnoskita de plimulto el la tutmondaj landoj.

**4 ekzekutoj en 2017**

Kun tiuj ekzekutoj, la totala nombro de malliberuloj ekzekutitaj en Japanio en 2017 atingas kvar. Plejofte, la malliberuloj estas informitaj pri sia ekzekuto nur kelkajn horojn antaŭ ĝi; kelkfoje ili eĉ tute ne estas informitaj. Iliaj familioj, advokatoj kaj la loĝantaro estas ĝenerale informataj post la ekzekuto.

Antaŭ 10 jaroj, la Ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj adoptis sian unuan rezolucion, alvokantan al moratorio pri aplikado de la mortopuno. La tutmonda movado favore al la abolo daŭras samtakte, sed Japanio plu ignoras tiun tendencon.

Hakamada Iwao, dungita en uzino de sojo, estis arestita en aŭgusto 1966 pro la murdo de sia dunganto, de lia edzino kaj de iliaj du infanoj. Du jarojn poste, li estis mortokondamnita per pendumo. Li plurfoje kriis sian senkulpecon, tamen en 1976 la apelacia kortumo konfirmis la mortopunon, kaj poste ankaŭ la japana Ĉefkortumo en 1980.

Analizoj pruvis, ke lia DNA ne koincidas kun tiu, trovita sur la vestaĵoj de la supozata kulpulo. La 27-an de marto 2014, li finfine estis liberigita post duonjarcento trapasigita en la mortokoridoro, kaj li estis rejuĝita.

Li tenas la rekordon de la mortokondamnito, kiu trapasigis la plej longan tempon en la mortokoridoro.

Neniam Milito Inter Ni

# Botelo de pli ol unu miliono da eŭroj antaŭnelonge ŝtelita estis trovita

Lastvendrede, la 5-an de januaro, la dana polico informis, ke estis trovita malplena sed konservita botelo vodka kies valoron oni taksas je 1,1 milionoj da eŭroj, kaj estis ŝtelita la 1-an de januaro el la drinkejo “*Cafe 33*” en Kopenhago, supoze fare de du uloj filmitaj dum ŝtelo.





Laŭ la televidkanalo TV2, tiu botelo de la marko de vodko “*Russo Baltique*” estis farita el 3 kilogramoj da oro kaj 3 kilogramoj da argento, kaj ĝi havas ŝtopilon inkrustitan per diamantoj.

La mastrumanto de la drinkejo, kiu posedas 1 200 botelojn de vodko, diris al loka gazeto, ke tiu botelon pruntis al li la fabrikanto de aŭtomobiloj *Dartz*, la rusa milionulo Leonard F. Yankelovich.


Iu laboristo ĉe konstruaĵo en *Charlotenlund*, norde de la urbo, trovis la botelon tie, laŭ informo de la aŭtoritatoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---

# Esperanto elstaras en greka kalendaro

Esperanto aperis elstare en kalendaro disdonita al membroj de la Bankoficista Sindikato de la Nacia Banko de Grekujo. La ĉi-jara eldono estas dediĉita al verkistoj.




En ĉiuj paĝoj aperas libro-kovrilo. En la Januara paĝo la foto presita estas de la libro “*Esperanto, la lingvo de espero*” (*Esperanto, η Γλώσσα της Ελπίδας*), verkita de la greka esperantisto Kostas Kiriakos.

La eldonistoj de tiu kalendaro pravigis sian elekton dirante, ke la elpensaĵo de Kiriakos reprezentas ĉies sentojn komence de nova jaro.

Esperanto Ilustrita

# En la fundo de la reto

Apenaŭ 1% el la globala (inter)reto estas videbla sur la ekrano, kiam vi enŝaltas vian komputilon kaj uzas ordinarajn retumilojn kiel ekz. Guglon. Tio signifas, ke kutime vi havas kelkajn milionojn da eblecoj serĉi diversajn aferojn, kanzonojn, filmojn, blogaĵojn, informojn – kion ajn. Verŝajne temas pri miliardoj da ligiloj al diversaj paĝoj, kio estas nur unu procento, al kiu vi havas la aliron. La cetero de la reto estas ankaŭ akirebla, sed multe malpli konata de ĉiuj retumantoj.



Sed ekzistas ankaŭ malpli konata parto de la reto. Kutime en plej diversaj diskutejoj oni uzas tiajn anglajn difinojn kiel „*deep web*" (profunda reto) kaj „*dark web*" (malluma reto) aŭ *„freenet"* (libera reto). Temas pri kaŝitaj retpaĝoj, kiujn ne rekonas kutimaj retumiloj, alivorte ili estas „nevideblaj" por ni. La Kalifornia Universitato en *Berkeley* en 2001 kalkulis, ke tiu ĉi „kaŝita reto" entenas eĉ 7,5 petabajtojn da datumoj.

Oni supozas, ke ekzistas 5 bazaj niveloj de la reto. Ordinara retumanto traserĉas la nivelon „0", kiu estas alirebla por ĉiuj, ĉar ĝi estas laŭleĝa, kaj ni nomu ĝin la „teretaĝo". Sed ni klopodu iom malsupreniri al la nivelo „-1", t.e. al la reta „kelo". Ĉi tie vi povas jam trarigardi, kiom granda retparto troviĝas „sub" vi. Iom pli sube, troviĝas la nivelo „-2", kien oni plu povas „eniri" preskaŭ normale, ankaŭ pere de Guglo, sed uzante iom pli komplikajn algoritmojn. Vi trovos tie iujn „subterajn" paĝojn de plej diversaj „ribeluloj". En la jaroj 1990, kiam ne ekzistis ankoraŭ limigoj alŝuti al la reto materialojn liberkvante, diversaj personoj alŝutadis grandegajn kvantojn da materialoj, kiuj simple restis tie, sed troviĝas nun kvazaŭ ekster nia kutima trovebleco.

Nur sur la nivelo „-3" situas t.n. „mallumreto", kiu estas nevidebla, profunde kaŝita retparto, disponebla al fidindaj retumantoj, kiuj kreas ofte specialajn rektajn retligojn inter si, kun ĉifritaj salutvortoj. La nivelo enhavas diversajn piratajn retpaĝojn, ankaŭ tiujn de trukuloj, kodumuloj ktp. Mi ne kuraĝas tie ĉi listigi pli da fienhavo de la retnivelo, pri kiu oni parolas en la retaj diskutejoj. Mi menciu nur, ke ili koncernas homojn de politiko kaj aliajn gravulojn, kaj ke la informoj tie estas por multaj personoj tre maloportunaj. Kompreneble mi havas neniun bezonon ekkoni la sferon kaj mi neniam tiel malalte en la reto estis.

Verŝajne ankoraŭ multe pli drastaj enhavoj estas riceveblaj ĉe la nivelo „-4", kiu estas la parto de t.n. „profunda" reto. Ĝi entenas i.a. kontraŭleĝajn anoncojn, komercadon, drastenhavajn filmojn. Troviĝas tie tiu plej „libera" monda merkato. Mi ne konsilas al iuj scivolemuloj eniri tien, ĉar ili povus tiamaniere elŝuti grandajn problemojn al si, ĉefe pro tio, ke la fundo de la reto estas kontrolata de specialaj servoj, kiuj danke al tio klopodas preventi plej

diversajn krimojn.

En tiu malbela mondoparto oni aperigas filmojn pri armeaj eksperimentoj, ekzekutoj, ĉio, kio kaze de iu provo aperigi ĝin en la nivelo „0”, tuj estu forigita el la reto.

Verŝajne ekzistas ankaŭ la nivelo „-5”, sed la aliro tien sen speciala grandpova komputila aparataro neniel estas ebla. La nivelo estas komparata kun la oceana fosego, kaj ĝi estas plej mistera loko en la reto, kiu onidire entenas ĉ. 94 procentojn de ĉiuj retdatumoj. Imagu, ke sur la niveloj 0, -1, -2 kaj -3 vi vidas nur kelkajn procentojn, kio jam mem estas malfacile imagebla kvanto. En la „minuskvina nivelo” – 94-oble pli granda ol la „nula” laŭ onidiroj troviĝas tekstoj, fotoj, filmoj, sonoj, kiuj estas kompromitigaj por ĉiuj famuloj de la mondo. La eblecon eniri tien posedas verŝajne nur personoj ligitaj kun la projektado kaj kreado de la granda reto.

La reta fundo estas loko de anonimeco. Anonimeco kaj la libereco paroli konsistigis iam la plej grandan valoron de la retumantaj tie personoj. Sed anonimeco signifas ankaŭ senpunecon, el kiu rezultas ofte plej diversaj trouzecoj. Honesto neniam bezonas kaŝi sin.

Andreo Bach
Esperanta Retradio



## Kornel Makuszyński

**Kornel Makuszyński (naskiĝis la 8-an de januaro 1884 en *Stryj* (nun en *Lviva* provinco), mortis la 31-an de julio 1953 en *Zakopane*) – pola prozisto, poeto, felietonisto, teatra kritikisto kaj publicisto, membro de Pola Akademio de Literaturo. Antaŭ la dua mondmilito estis unu el la plej legataj, popularaj kaj fekundaj polaj verkistoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Monaĥejo *Gandzasar* (armene: Գանձասար) armena monaĥejo de la 13-a jarcento en regiono Martakerto en Montara Karabaĥo.**

**Vikipedio**

# Novaj horizontoj trans Plutono

En 2015 la spacmisio “Novaj Horizontoj”, sendita de NASA en 2006, vizitis Plutonon, la lastan planedon de la sunsistemo, kiu neniam antaŭe estis esplorita de spacesplorilo. Efektive, Plutono ne plu estas konsiderata planedo, ĉar samjare, en 2006, la Internacia Astronomia Unio decidis modifi la difinojn de planedo kaj kreis novan grupon de etaj astroj nomataj “nanoplanedoj”, al kiu nun apartenas Plutono kaj kelkaj aliaj similaj objektoj, eĉ pli foraj de Suno. La esplorilo “Novaj Horizontoj” preterflugis Plutonon kaj estis direktita por viziti ankoraŭ pli foran astreton, unu el multegaj orbitantaj Sunon en la tiel nomata Kuiper-a Zono [nomita laŭ nederlanda-usona astronomo Gerard Peter (Gerrit Pieter) KUIPER ['kœɣpər] (1905 dec 07 – 23 dec 1973) kiu unue antaŭvidis ĝian ekziston].



**La planedoserĉantoj**

Ĝis la 18-a jarcento la homaro konis nur kvin planedojn, kiuj estas videblaj per la nuda okulo: Merkuro, Venuso, Marso, Jupitero kaj Saturno. En la dekoka jarcento astronomoj sugestis la ekziston de plia planedo, trans la orbito de Saturno, pro perturboj al ties orbito.

En 1781 ĝi estis malkovrita de William HERSCHEL kaj nomita Urano. Sesdek kvin jarojn poste en simila maniero estis malkovrita Neptuno, pro perturboj en la orbito de Urano. Komence de la 20-a jarcento, amatora astronomo Percival LOWELL sugestis, ke devioj en orbito de Neptuno estis kaŭzitaj de pli malproksima objekto, kiun li nomis planedo X. Li kalkulis ĝian supozatan lokon esperante ke ĝi estos malkovrita kiel Neptuno, kiu estis malkovrita en 1846 kalkulante la perturbojn de la kalkulita orbito de Urano. Ĝi estis efektive malkovrita en 1930 de la juna observanto Clayde TOMBEAUGH [Tombo]. Oni nomis la novan planedon Plutono, laŭ la frato de Jupitero, dio de la infero en la romia mitologio. Sed la nomo ankaŭ memorigas la unuajn literojn en la nomo Percival LOWELL. Poste evidentiĝis, ke la maso de Plutono estas multe pli malgranda ol necese por influi la orbiton de Neptuno. La neptuna orbito-deviado estis klarigita per pli preciza mezurado fare de *Voyager* en 1989.

**Plutono fariĝis nanoplanedo**

Plutono orbitas Sunon en distanco 30-50-obla ol tiu de Tero kaj havas temperaturon de minus 237 C° (44 gradoj super la absoluta nulo). Ĝi diferencas de ĉiuj aliaj planedoj laŭ sia orbito kaj laŭ siaj fizikaj kvalitoj. Ĝi ne nur estas la plej malproksima de Suno, sed ĝia orbito estas elipsa, kontraŭe al la aliaj planedoj kies orbitoj estas preskaŭ cirklaj. Ĝia orbito ankaŭ estas kliniĝinta al la ekliptiko, la ebeno, en kiu Tero kaj ĉiuj aliaj planedoj ĉirkaŭas Sunon. Kiam oni sukcesis sufiĉe akurate mezuri la grandecon de Plutono, evidentiĝis ke ĝi estas multe malpli granda ol oni pensis – ĉirkaŭ triono de nia Luno. Ankaŭ laŭ la konsisto ĝi diferencas – dum la aliaj planedoj estas precipe gasaj aŭ rokaj, Plutono estas farita ĉefe el glacio. Pro tio la astronomoj opinias, ke Plutono naskiĝis alimaniere ol la ceteraj planedoj.

En la 1990-aj astronomoj komencis malkovri plurajn astrojn, similajn al Plutono, sed ankoraŭ pli forajn de Suno (la plej granda el ili nomiĝas Eriso, kaj ĝi estas eĉ pli peza ol Plutono). Sekve la Internacia Astronomia Unio (IAU) decidis modifi la difinon de planedo, tiel ke Plutono ne plu estas konsiderata planedo, sed apartenas al nova grupo de malgrandaj astroj nomataj nano-planedoj. En ĝi troviĝas ankaŭ la plej granda asteroido – Cereso – kaj pluraj novaj astroj, kiuj troviĝas en la regiono

ekster la orbito de Neptuno, nomata la Kuiper-zono.

**La naŭa planedo**

En 2016 astronomoj anoncis observojn kiuj forte subtenas la ekziston de nova planedo, multe pli fora kaj multe pli granda ol Plutono. Ĉ. 100 jarojn post kiam astronomoj unue sugestis la ekziston de naŭa planedo en la suna sistemo, 85 jarojn post kiam Plutono estis malkovrita kaj fariĝis la "naŭa planedo", kaj dek jarojn post kiam la posteno de "naŭa planedo" denove ekvakis. La nova planedo ankoraŭ ne estas rekte observita, nur kalkulita laŭ ĝia verŝajna influo je la orbitoj de nanoplanedoj en la Zono de *Kuiper*. Efektive ne temas do pri vera malkovro de planedo.

Laŭ la esploro, publikigita la 20-an de januaro 2016 en la renomaj sciencaj revuoj *Astronomical Journal* kaj *Nature* de la esploristoj Batygin kaj Brown, la nova "naŭa planedo" havas mason dekoble pli grandan ol Tero, ĝia diametro estas 2-4-oble pli granda ol Tero kaj ĝi orbitas Sunon unu fojon en 10-20 mil jaroj, en longforma elipsa orbito 200-600-oble pli granda ol tiu de Tero (kompare kun 30-50 de Plutono).

Batygin kaj Brown kalkulis la ekziston de la planedo uzante matematikajn modelojn kaj simuladojn, surbaze de la orbitoj de ses malgrandaj korpoj en la Zono de *Kuiper*. La atendebla maso de la supozata planedo estas 5 000-oble pli granda ol tiu de Plutono, kio signifas, ke ĝi estas sufiĉe granda por konveni al la nova difino de planedo, Batigin kaj Brown montris kiel la naŭa planedo povas klarigi la orbitojn de la plej malproksimaj objektoj trovitaj en la Kuiper-zono.

Nun, post kiam ĝia orbito estis establita, esploristoj esperas, ke ĝi estos malkovrita ene de kelkaj jaroj. Dume Brown kaj aliaj astronomoj komencis serĉi la naŭan planedon per teleskopoj. La orbito estas konata nur krude, kaj ne estas klare, kie ĝi estas situanta. Se la planedo nuntempe troviĝus proksime al perihelio, la plej proksima punkto al Suno, ĝi estus pli brila kaj povus esti trovita en malnovaj fotoj de tiu regiono en la ĉielo. Se, aliflanke, ĝi momente situas ĉe la ekstrema fino de sia orbito, nur la plej grandaj teleskopoj de la mondo povus detekti ĝin.

**"Novaj Horizontoj" kaj MU69**

"*New Horizons*", lanĉita en 2006, estis akcelita per la pasado apud Jupitero kaj atingis Plutonon la 14an de julio 2015. Unuafoje la homaro ricevis proksiman rigardon de Plutono, kiu ĝis tiam dum pli ol okdek jaroj estis konata kiel punkto de pala lumo en la fora periferio de la sunsistemo. La misio malkovris kompleksan mondon, riĉan je interesaj detaloj. "*New Horizons*" sendis al Tero multajn detalan bildojn de Plutono kaj ĝia luno Karono. La frosta surfaco de Plutono ege varias de loko al loko kaj malkaŝas diversajn geologiajn formojn kaj plurajn specojn de frostita metano, solida nitrogeno, glacia akvo ktp. La analizo de la bildoj kaj mezuradoj daŭras ankoraŭ kaj malkaŝas novajn detalojn kaj variajn formojn.

Post la preterpasado de Plutono "Novaj Horizontoj" estis direktita por pasi, komence de 2019, apud la astro kun la kataloga nomo 2014 MU69, malkovrita en la Zono de *Kuiper* en 2010. Lastatempe NASA lanĉis publikan kampanjon por trovi pli allogan nomon por tiu fora glacia astreto. NASA invitis proponojn por pli interesa nomo, aŭ fakte nom-duopo, ĉar la objekto ŝajnas konsisti el du partoj. Responde mi proponis Esperanto kaj Zamenhof. Subtenis la proponon Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes, sed ĝis nun la komisiono ne inkludis tiun proponon en la liston de ĉ. 20 nomoj por kiuj eblis voĉdoni en la retejo de la kampanjo (vidu).

Amri Wandel
La Balta Ondo